

Nikolaus Lenau,  
Velkinta rozo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

En iu libro foliumis mi,  
kaj estis en ĝi rozo-flor',  
velkintis, dispremitis ĝi,  
tuŝata estis mia kor'.

Sed kiu iam plukis ĝin?  
Foriĝis longe la memor'.  
Se iam iu amis min,  
la amo iĝis longe for.

Aĥ, dum vespero pli kaj pli  
disiĝas tute la memor',  
kaj baldaŭ ne plu scios mi,  
ĉu min aminta estis kor'.

Kaj pli kaj pli dum la vesper'  
foriĝas ankaŭ la dolor',  
finiĝas mia voj' sur ter',  
kaj ĉesos bati mia kor'.

*Traduko de la Germana poemo "Welke Rose" de NIKOLAUS LENAU (\*1802-08.13 – †1850-08-22) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1982-12-21.*

*MR-023-1 / Arg-566-1145 (2010-09-20 12:19:57)*

Nikolaus Lenau,  
Welke Rose

In einem Buche blätternd, fand  
Ich eine Rose, welk, zerdrückt,  
Und weiß auch nicht mehr, wessen Hand  
Sie einst für mich gepflückt.

Ach, mehr und mehr im Abendhauch  
Verweht Erinnerung; bald zerstiebt  
Mein Erdenlos, dann weiß ich auch  
Nicht mehr, wer mich geliebt.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas NIKOLAUS LENAU (\*1802-08.13 – †1850-08-22).*

*Arg-566-1143 (2010-09-20 12:21:17)*